**Parolado ĉe Unuiĝintaj Nacioj de Greta Thunberg (22-09-2019).**
**Traduko de la itala esperantisto kaj verkisto Filippo Franceschi.**

Mia mesaĝo estas: ni observas vin. Ĉio ĉi estas erara. Mi ne devus esti tie ĉi, mi devus esti en mia lernejo sur la alia oceanbordo. Kaj male vi petis nin geknabojn veni ĉi tien pro la espero. Kiel vi aŭdacas? Vi ŝtelis miajn revojn kaj infanaĝon per viaj vakuaj paroloj, kvankam mi troviĝas inter la bonŝancaj gejunuloj. La personoj suferas, la personoj mortas, niaj ekosistemoj estas kolapsantaj, ni troviĝas je la komenciĝo de la sesa planeda estingiĝo, tamen ĉiuj viaj paroloj koncernas nur la monon kaj la fabelojn pri senfina ekonomika kresko.

Sed kiel vi aŭdacas? Dum pli ol 30 jaroj la scienco estis klara: kiel vi povas rigardi al alia direkto? Kaj veni ĉitien kaj diri, ke vi estas farantaj ĉion necesan, kiam ververe la politiko kaj la estraroj montriĝas ankoraŭ tute fremdaj? Vi diras, ke vi aŭskultas nin kaj komprenas la urĝon sed - ne gravas ĉu mi estas morna kaj kolera – mi ne plu kredas al vi. Se vi efektive estus komprenintaj la situacion, kaj samtempe agas tute erare, tiam oni devus konsideri vin denaskaj kanajloj. Kaj mi rifuzas tion kredi.

La komuna popola ideo draste fortranĉi la gas-elmetojn povus nur je 50% sukcesi limigi  la kreskon de la temperaturo sub 1,5°, kaj tiel eviti la  ĉen-reagojn de eventoj ekster la homa kontrolo. Tiu ĉi 50% povas eble esti akceptebla laŭ vi, sed tiuj numeroj ignoras plurajn kritikajn punktojn: la ciklajn reagojn, la kroman plivarmiĝon pro la poluado de la atmosfero, ĉiujn problemojn pri justeco kaj egaleco inter la landoj. Oni devas ja antaŭvidi ĉion ĉi, konsiderante ke ni kaj niaj gefiloj por pretervivi devus sorbi el la atmosfero milionojn da tunoj de $CO_2$ (karbon-dioksido) per teknologioj hodiaŭ ne ekzistantaj.  Tial tiu 50%-a risko estas neakceptebla de ni kaj de la novaj generacioj kiuj travivos la konsekvencojn de la hodiaŭa situacio.

Por altigi ĝis 67% la eblecon limigi la kreskon de la planeda temperaturo sub 1,5° , la inter-estrara komisiono pri la klimata ŝanĝo prezentas unu solan rimedon: la mondo devus elimini 420 gigatonojn el karbon-dioksido ekde la unua de januaro 2018. Kiel vi aŭdacas pensi, ke tia giganta kvanto da $CO_2$ povos esti eliminata kun la nuna ekonomika sistemo kaj kun la nunaj teknologioj?

Konstatinte tiujn datenojn, hodiaŭ ne estas facile trovi solvojn nek planojn por gardi  la temperatur-kreskon sub 1,5°. Eble la homaro ne estas matura  por alfronti tian situacion.

Vi seniluziigis nin. Sed la monda junularo komencas kompreni vian perfidon. La rigardo de la novaj generacioj sekvas vin de supre. Ĉi tie, en ĉi tiu momento, ni signas la lim-strekon: la planedo estas vekiĝanta, la epok-ŝanĝo estas

alvenanta.

---

Ne ekzistas eŭfemismoj en la parolado de Greta. Ŝiaj karismo kaj decidemo frontis la plej potencajn homoj de la planedo dum la ĝenerala kunveno de ONU pri la klimato-ŝanĝoj. Ĝuste ilin ŝi akuzas, ĉar ili ne faris ĉion eblan por eviti, ke oni preterpasu la “nereven-punkton”. Greta volas evidentigi la malfidon de la junularo kontraŭ estraroj kaj politikistoj tre malatentaj pri la klimataj problemoj. La juna sveda aktivulino utiligas precizajn ciferojn kaj klarajn datumojn por diri, ke jam malmulton oni povas fari kaj, ke la rimedoj proponataj far la mondaj ekomikaj sistemoj estas tute nesufiĉaj.

Estas formiĝanta frakturo inter la mondo de la planedaj estraroj kaj la novaj generacioj. Frakturo kiu iĝos ĉiam pli larĝa se oni ne urĝe adoptos vere efikajn agojn por savi la ekosistemojn kaj entute la vivon sur la planedo.